



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Majo 2016 n-ro: 5

Saluton!

Jam la monato de majo alvenis. En la pasinta monato la plej grava okazajo estis la 9-a Mezorianta Kunveno, kiun ni organizis en Urgupo, en la regiono de Kapadokio. La kunveno estis sukcesa kaj ĉiuj kontentiĝis.



Bonan legadon al ĉiuj! Merhaba!

Mayis ayı geldi bile. Geçen ayın en önemli olayı Kapadokya'nın Ürgüp kasabasında organize ettiğimiz 9. Ortadoğu Buluşması idi. Toplantı çok başarılı geçti ve herkes memnun kaldı.

Post la diskutoj kaj prelegoj en la Kunveno oni verkis la rezolucion de la kunveno, kies grava parto estis la sugesto al UEA fari paŝojn pere de la teamo, kiu partoprenas en la UN asemblejo, kontakti UNHCR por organizi instruadon de Esperanto al la rifuĝintoj, kies cellando ankoraŭ ne estas definitiva en la rifuĝejoj de Turkujo kaj eble ankaŭ en Grekujo, kiel prepedeŭtika lingvo.

La dua sugesto estis por la Komitato de UEA, ke ili elektu malsimilan kanalon por disvastigi Esperanton en la arabaj landoj ĉar estas granda antaŭjuĝo pri ĉio, kio venas al ili el okcidento kaj ĉefe el Eŭropo. Eble kanaloj kiel Irano, Barato, Ĉinujo ktp estus pli efikaj por tiu celo.

Vi trovos artikolon kaj galerion de fotoj en ĉi tiu revueto pri la 9-a Mezorianta Kunveno, kiun ni esperas vi ĝoje legos....

Bonvolu skribu al ni...

Toplantıdaki bir çok tartışma ve sunumun ardından sonuç bildirgesi kaleme alındı. Bunun önemli bi kısmı UEA'ya, BM'deki oturumlara katılan ekibinin mülteciler alt komisyonu UNHCR ile kontak kurması ve Türkiye ile Yunanistan'daki kamplarda kalan ve henüz gidecekleri ülkelere karar vermeyen mültecilere daha sonra öğrenecekleri ülke diline temel teşkil edecek şekilde Esperanto dilinin öğretilmesi için adımlar atılması idi.

İkinci tavsiye ise UEA Komitesine Arap ülkelerinde Esperanto dilinin yaygınlaştırılması için gerekli çalışmalara farklı kanal bulunması idi. Çünkü bu ülkeler batıdan ve özellikle Avrupa'dan gelen her yeni şeye karşı son derece önyargılı durumdadır. Belki İran, Hindistan ya da Çin çok daha etkin kanallar olacaktır.

Bu dergimizde 9. Ortadoğu Buluşması hakkında zevkle okuyacağınızı umduğumuz bir makale ve fotoğraf galerisi bulacaksınız...

Lütfen bize yazın.



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Saluton!	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA novaĵoj	3
TEJO novaĵoj	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Nederlandanoj en Alanya	4
Legajo - Midaso	5
Gramatiko	8
Portreto - Katalin Kováts	9
Feliĉan Tagon de Patrinoj	9
Volontula Domo por UEA	9
La 9-a Meorienta Kunveno en Urgupo	10
Studio-Radio Televido Prezentas	13
Poemo de Melih Cevdet Anday	14
Legajo - La Kvar Amikoj	16
Mallonga Historio de Filozofio (4)	18
Veganarto	19
Kio estas edukado.net	20
Krucvort-enigmo (facila)	20
Ŝercoj!	21
Tempo de Tulipoj por Istanbul	21
Esperanto Kurso 5	22
Kvina Moskva Esperanto-renkontiĝo	23
Fermo / Kapanış	24
Demisio de Stefano Keller	24
MEMRISE - Esperanto Temel Kurs (Sesli)	24

Kursoj



1) Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto.

La kurson gvidas Murat Özdizdar kaj Vasil Kadifeli. Ni preskaŭ estas en la fino de la libro "Esperanto per Rekta Metodo"

2) Kurso por komencantoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul.

La kurso daŭras sukcese kaj la gvidanto estas Murat Özdizdar.

3) Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo.

La kurson gvidas matematisikto Utku Gürdal. Utku sekvas iomete liberan kurs-programon por ke li ne ĝenu la kursanoj. Nuntempe estas la espero, ke eble lernantoj de la antaŭa lerneja-periodo kiuj forlasis la kurson por diversaj kialoj, denove aliĝos. Do eble la kurso havos preskaŭ 30 interesiĝantojn, kaj tiio estos grava sukceso .

STUDO RADIO-TELEVIDO EN ESPERANTO

Prezentas

GAZETARA TRARIGARDO

<http://novajhoj.weebly.com/gazetara-trarigardo.html>



AŬSKULTU ESPERANTO-RADIOJN !



Radio Vaticana

<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>



<http://pola-retradio.org/>

<http://esperanto.cri.cn/>



<http://esperanto-tv.com/radio>

<http://muzaiko.info/a%C5%ADskultu>



Radio Havano Kubo

Amika voĉo kiu trairas la mondon

ubo



Muzaiko

Malnovaj numeroj estas elŝuteblaj el:

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revuet/>

Konatiĝu kun turkaj esperantistoj ĉe:

<https://web.facebook.com/groups/7121509722/>

Kontak- adreso:

vasilkadifeli@gmail.com

Ni atendas leterojn de niaj legantoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

Esperanto-Sumoo



Rezulto de la marta Esperanto-Sumoo

La 39-a Esperanto-Sumoo okazis inter la 13-a ĝis la 27-a de marto kaj partoprenis 248 legantoj el 26 landoj. Malpli ola la januara Sumoo. Perfektaj venkintoj (15 venkoj) estis 198 el la 248 (79,8%) legantoj. Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 15,467 paĝoj kaj averaĝe unu homo legis 62 paĝojn dum 15 tagoj. Entute 14 esperantistoj prizorgis tiujn 248 legantojn kaj kolektis iliajn raportojn.

El Turkujo ĉi foje partoprenis nur du legantoj (Fatih Emre Can kaj Vasil Kadifeli) kaj ĉiuj venkis ĉiujn 15 tagojn kaj gajnis diplomon.

La maja Sumoo okazos inter la 8-a ĝis la 22-a de majo.

Bonvolu aliĝi kaj legi kune kun la Esperantistoj de la tuta mondo. Vi povas legi kion ajn vi volas kaj eĉ po unu paĝo tage. Ne estas limo por partopreni en la Esperanto-Sumoo. Tio kio gravas estas legi por plibonigi vian lingvan nivelon kaj helpi la Esperanton kulturon kreski.

Por pli da informoj vizitu la retejon de la Sumoo kies ligilo estas : <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

La ligilo por la facebook grupo de la Sumoo, "Esperanto-Sumoo" estas : <https://web.facebook.com/profile.php?id=759066970888217>

Ne forgesu aliĝi!

UEA



N-ro 608 (2016-03-04) OK KANDIDATOJ EN ELEKTO DE SES KOMITATANOJ "B"

Ok Esperanto-aktivuloj konkursos pri la rajto reprezenti la individuajn membrojn de UEA en la Komitato de la Asocio dum la periodo 2016-2019. Ses el ili estos elektitaj kiel komitatoj B per poŝta balotado, kiu komenciĝos en aprilo. La nombro de kandidatoj estas malpli ol tiu en 2010, kiam 12 membroj kandidatiĝis, sed pli ol en 2013 kiam la elekto okazis inter 7 personoj.

La kandidatoj estas, en alfabeto ordo, Emilio Carlos Vaz Cid (Brazilo), Johan Derks (Serbio), Mark Fettes (Kanado), Maritza Gutiérrez González (Kubo), Stefan MacGill (Hungario), Roy McCoy (Nederlando), Barbara Pietrzak (Pollando) kaj José Antonio Vergara (Ĉilio).

La voĉdonado okazos laŭ la maniero priskribita en la Ĝenerala Regularo.

Atentu, ke por ricevi voĉdonilon vi devas esti individua membro de UEA kaj havi aktualan poŝtadreson en la datumbazo de UEA. Por aliĝi vidu ĉe <http://uea.org/alighoj/alighilo> kaj vi povas kontroli vian poŝtadreson post ensaluto ĉe <http://uea.org/via/>.

<http://www.uea.org/aktuale>

TEJO



Nro 422, 2016-03-04

TEJO SUBSKRIBIS LETERON POR

PLEDI FAVORE AL LA SCHENGEN-PRINCIPOJ

TEJO subskribis leteron al la Eŭropa Konsilio por pledi favore al la Ŝengen-principoj kun 15 aliaj internaciaj junularaj organizoj ĉar TEJO celas "plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sendepende de diferencoj rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo" kaj libera moviĝeblo en la Ŝengen-landaro estas grava afero por TEJO kiel internacia organizaĵo.

ALVOKO POR NOVA KOMISIITO PRI LANDA AGADO EN AZIO

TEJO urĝe bezonas komisiiton pri Landa kaj Regiona Agado en Azio! Esti aktiva en TEJO donas al vi ŝancon renkonti multajn junajn aktivulojn el aliaj landoj, ekhavi spertojn, kiuj utilos al vi ankaŭ poste, kaj progresigi la celojn kaj idealojn de la Esperanto-movado.

APERIS NOVA NUMERO DE LA REVUO KONTAKTO

La unua ĉi-jara numero de Kontakto jam legeblas rete. Richard Delamore, fama Esperanta jutubisto kaŝnome konata kiel Evildea, respondis al la redaktoro demandojn pri la kanalo, ĝia futuro, la malantaŭkulisita laboro de jutubisto kaj multe pli. La numeron superregas la kovrila temo Literaturo, al kiu estas dediĉitaj kvin artikoloj.

<http://uea.org/aktuale/tejo>
<http://tejo.org/>

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Tre kara kaj estimata amikoj,

Saluton. Mi elkore dankas vin por sendi al mi vian belegan revuon TURKA STELO 004. Ĝi estas enhavriĉa, helanta revuo el belega Turkio. Mi gratulas vin kaj aliajn Turkajn amikojn pro dediĉoj al nia lingvo Esperanto. En majo ĉijare mi



planas vojaĝi al Pakistano kaj Irano. Mi ege ŝatas renkonti vin kaj aliajn Turkajn fratojn en Instanbulo.

Bonvole akcepti miajn elkorajn bondeziroj,
Amike via

Mian Salam SHANY

Nederlandanoj en Alanya



En mia unua artikoleto mi eksplikis kiel mia edzino kaj mi konatiĝis kun Turkio, decidis elmigri el Nederlando kaj ekloĝi en Oba, kvartalo kiu poste iĝis parto de Alanya. Kiam ni luis apartamenton en Oba, Alanya havis cirkaŭ 110.000 loĝantojn, sed post la kunfandiĝo kun

granda nombro da ĉirkaŭantaj komunumoj la nombro kreskis al 285.000 (2014) kaj en la somera sezono estas miloj da turistoj kiuj draste pliiĝas la nombron.

Alanya-n, la urbo en kiu ni ekloĝis antaŭ 7 jaroj, ni elektis ĉar nia opinie ni povas de ĉi tie sufiĉe facile iri al multaj ĝuindaj kaj interesaj (historiaj) vidindaĵoj en Turkio. Estas nekomplika urbo kun komunumestro kiu serioze klopodas plezuri ambaŭ la lokajn kaj provizorajn loĝantojn.. Tial ĝi organizas multajn sportivajn kaj kulturajn aktivajn . Evidente en la somera periodo turismo estas tre grava afero: en la bazaro en la centro de la urbo, tute proksime de la agrabla kaj intimeca haveno estas plejofte abelujo de aktiveco. La multaj malgrandaj butikoj prezentantaj ĉiajn grandegajn 'mark'produktojn, sed ankaŭ ĉiajn bagatelaĵojn altiras multajn turistojn. Do oni povas tre agrable ferii ĉi tie alternante vizitojn de la plaĝo per butikumi en la bazaro aŭ en la butikstratoj. Ĉe la haveno estas sufiĉe da eblecoj por dumvespere aŭ dumnokte manĝi, trinki kaj danci.

En Alanya troviĝas du gravaj butikstratoj: unu estas Atatürk Bulvarı, samnomigita kompreneble laŭ la plej

fama el la modernaj Turkioj, la alia pleje nomiĝas la 25 metroj strato. Ĝi situas paralele al la unua. En ambaŭ stratoj, la unua fakte la granda bulvarado tra la urbocentro, oni trovas sinsekvon de butikoj, bankoj (retiri monon senprobleme), monŝanĝejoj (ŝanĝi monon senprobleme), restoracioj, butikoj por modaĵoj, ŝuoj, bagatelaĵoj, mansaketoj k.t.p.


Niajn manĝaĵojn ni plejofte aĉetas en diversaj supermerkatoj kaj en la semajnbazaro. Ĉar ni ne posedas aŭtomobilon kaj loĝas sufiĉe fore de la urbocentro ni dependas de urba aŭtobuso kiu preterpasas unufoje hore. Per tiu buso ni veturas al la urbocentro, plejofte sabate, kiam ni povas profiti de la bazaro tie kaj samtempe ankaŭ povas viziti grandan supermerkaton kie ni inter alie aĉetas provizon da pano por unu semajno, kiu hejme ni englaciĝas, Tie ni ankaŭ aĉetas sufiĉe grandajn kvantojn da legomoj kaj fruktoj. Poste ni prenas la saman buson kiu rekondukas nin kun niaj aĉetaĵoj al la aŭtobushaltejo ĉe nia domo.

Cetere ni konstatis ke la sortimento de produktoj en la supermerkatoj etendiĝas kaj pli kaj pli ili prezentas ankaŭ produktojn kiujn ni ne povis trovi kiam ni ekloĝis en Alanya.

Kaj ja farante oni lernas fari. Kiam oni estas ĉi tie por pli longa tempo oni devas ĉion malkovri, evidente ofte baziĝante sur alies spertoj, Nederlandanoj aŭ aliuloj kiuj jam pli frue ekloĝis ĉi tie.

Fons Doomen
Alanya, 2016-03

Jam pli ol mil partoprenantoj en la 101-a UK en Nitro (Slovakio) !






Malnovaj Grekaj Mitoj

MIDASO - Eduard Petiška

En Frigio, en Malgranda Azio regis antaŭ longa tempo reĝo Midaso, granda adoranto de la dio Dionizo. Li vivis en pompa burgo kaj estis



nemezurable riĉa. Li mem pensis, ke li estas ankaŭ nemezurable prudenta kaj, ke nur li povas plej bone decidi ĉion. Kaj kiel tio kutime okazas, ĉar li estis reĝo kaj havis la potencon, neniu protestis kontraŭ lia orgojlo.

lutage kamparanoj kondukis al la reĝo ebrian oldulon, kiu apenaŭ plu povis teni sin sur la piedoj. Ili kulpigis lin, ke ili trovis la viron en la reĝaj vinberaj ĝardenoj, kie li plukis la plej belajn kaj plej grandajn vinberojn. Ili eĉ povintus ŝpari al si la plendon. La kalva, de la trinkado grasventra oldulo, estis tute kovrita sur la mentono kaj sur la manoj per la suko de maturaj vinberoj, eĉ sur la verda krono de sia kapo li havis malhelajn makulojn kaj lia krono estis tute ĉifita.

Midas tuj ekkonis, ke la oldulo estas Sileno. Sileno apartenis al la aro de la gaja dio. Li iam edukis la malgrandan Dionizon kaj de tiam ne plu forlasis lin. La reĝo solene kaj ĝoje bonvenigis la raran gaston. Li ordonis prepari la plej bonan manĝon, alporti hosojn kun la plej bonaj vinoj kaj li alvokis kantistojn kaj muzikistojn, por ke ili kantu kaj ludu ĉe la festeno.

Dek tagojn kaj dek noktojn la reĝo festenis kun Sileno kaj la aliaj invititaj gastoj. La arĝentaj pokaloj dum la tuta tempo ne elsekiĝis, ili trinkis la vinon nemiksitan kun akvo, kio plezurigis kaj ĝojigis la gastojn. Dek tagojn la servistoj nutris la flamojn en la kuirfornoj kaj la kradoj ne havis tempon malvarmiĝi. La tabloj fleksiĝis kaj krakis sub la ŝarĝo de la plenaj pladoj, kaj la tuta palaco zumis kiel abelokorbo. Tage kaj nokte eksonis el la burgo kaj flutoj kaj liroj kaj ĝoja kantado.

Je la dekunua tago la reĝo kunstarigis el la ebrietaj gastoj festprocesion. Al Sileno li donis azenon, ĉar li sciis, ke Sileno plej prefere rajdas sur azeno. La aliaj akompanis la karan gaston sur ĉevaloj, sur ĉaroj kaj surpiede. Kantante kaj jubilante ili iris en la najbaran landon, kie Dionizo ĝuste restadis.

Ili renkontis la dion Dionizo, kiu sidis sur ora, de tigro tirata veturilo kaj serĉis sian patrecan edukinton. Li ĝojis, kiam li ekvidis Silenon sur azeno en tia nobla akompano, ornamitan per floroj kaj folioj.

"Deziru al vi, kion vi volas", la dio vokis al la reĝo, por tiu servo mi plenumas al vi deziron. Kiun donacon vi deziras?"

Midaso kliniĝis antaŭ Dionizo kaj montris vizaĝon kiel eble plej prudentan: "Ho faru, ke ĉio, kion mi tuŝas, transformiĝas oren."

Dionizo ridis pri la deziro de la reĝo kaj diris: "Vi, reĝo, prefere estu elektinta pli bonan donacon. Sed via deziro plenumiĝos.

Feliĉe Midaso revenis hejmen. Li estis fiera pri sia ruzeco. Neniam estos sur la mondo reĝo pli riĉa ol li! Senpacience li provis jam survoje, ĉu la dio efektive plenumis sian deziron. Li derompis de arbo branĉeton kaj apenaŭ fidis siajn okulojn. La branĉeto kune kun la folioj flave eklumis, ĉio estis pura oro. Li levis ŝtonon kaj tenis mane trembrilan orbulon. Li tuŝis argilan bulon, kaj ankaŭ la argila bulo tuj estis oro. Li preteriris kampon, plukis kelkajn maturajn spikojn, kaj en liaj fingroj ektintis oro. Li ĉirkaŭiris en la reĝa ĝardeno, etendis la manon al pomo, kaj tuj ora pomo falis de la arbo en ĝin.

Tute freneza pro ĝojo Midaso kuris en la burgon, kaj apenaŭ li tuŝis la pordegon, ĝi ekbrilis en oro.

Li fortiris la kurtenon, kaj jam la kurteno rigidiĝis je ora vando.

Jen li ordonis pretigi ampleksan manĝon. Li lavis al si la manojn kaj observis kun malsaĝa ridado, kiel oriĝanta akvo traglitis inter la fingroj. Li sidiĝis al la tablo kaj kaptis al la pano. Sed antaŭ ol li povis ŝovi paneron en la buŝon, li tenis en la mano anstataŭ ĝi puran oron. Li kaptis al la rostaĵo, sed la rostaĵo transformiĝis ekbrilante en oron. La reĝo vokis la servistojn al si, por ke ili nutru lin. La servistoj donis la

manĝon al lia buŝo, sed tuj kiam liaj lipoj tuŝis ĝin, li mordis sur oron. Eĉ la vino en lia buŝo transformiĝis en oron.

Jen enmeze de la abunda oro la reĝon kaptas hororo. Ekregis lin teruro pri sia deziro, ĉar li ekvidis ĉirkaŭiri la embuskantan morton.

Tremante pro timo li rapide ordonis seli sian ĉevalon. Galopante li postrajdis Dionizon kaj rimarkis plena de hororo, ke ankaŭ la brido en sia mano ŝanĝiĝis en oron.

Ĝoja kantado perfidis al li la lokon, kie Dionizo kun sia akompanantaro ripozas. Midaso saltis de la ĉevalo kaj surgenuiĝis antaŭ la dio: Pardonu al mi, favora dio, mian deziron", li lamentis, "kaj liberigu min de mia turmento!"



Dionizo kompatis la malfeliĉulon kaj donis konsilon al li: "Iru al la rivero Paktolos", parolis la dio, "kaj tute trempu vin en la akvon. Tiel vi forlavos de vi vian malfeliĉan deziron".

Sen hezito Midaso rapidegis al la rivero, ĵetiĝis en la akvon kaj lavis ankaŭ la kapon kaj la hararon. Ekde tiu tempo oni trovas en la rivero oran sablon kaj la homoj diras, ke la rivero estas orhava.

La reĝo ĝojis, ke li liberigis sin de la terura donaco kaj ekde nun eĉ ne plu volis vidi oron. Pli prefere li migradis sur herbejoj kaj en boskoj kaj aŭskultis kiel Pajno, la mastro de la paŝtejoj kaj protektanto de la gregoj, ludas sur la sirinkso, la kana pajnoŝalmo. La bokpieda kornohava dio Pajno, saltetis tute kovrita per feloj tra la arbaroj kaj ludis kun la nimfoj memkaŝadon kaj timigis la migrantojn. Kaj kiam li sidiĝis en la ombro de la arboj, li blovis sur sia septuba fluto

multajn gajajn kantetojn. Tiuj plaĉis al la reĝo pli ol ĉio alia en la mondo.

Pajno vidis kiel plaĉis siaj kantoj kaj komencis imagi, ke li ludmuzikas pli bone ol la muzogvidanto Apolono. Li vokis la dion de la Patmosol-montaro al si, por ke li decidu, kiu ludas pli bone, li aŭ Apolono.

Tmolos konsentis kaj deŝovis de siaj oreloj la branĉojn de pramaljunaj arboj.

Unue ludis Pajno sovaĝan barbaran kanton. Ĉe la arbarrando staris Midaso kaj aŭskultis ĝojigite la flutosonojn, kiuj kriĉadis kiel ŝrikkantaj birdovoĉoj, kiuj fajfis kiel la vento en la rokoj kaj hopis tra la aero kiel riverondoj super trans ŝtonojn.

Pajno finis sian ludadon kaj Tmolos donis signon al la dio Apolono. Apolono forĵetis la purpuran mantelon kaj ekkaptis per la maldekstra mano la belegan liron.

Softe li tuŝis la kordojn, kaj la kordoj komencis rave kanti. En la vespera kvieto la dolĉaj sonoj leviĝis kvazaŭ sur delikataj arĝentaj flugiloj en la ĉielon.

Kortuŝite de la kantado de Apolono, Tmolos petis Pajnon, ke li mallevu sian sirinkson antaŭ la liron de Apolono.

La ĉiela kantado de Apolono venkis la kantetojn de Pajno.

Midaso aŭskultis la juĝon nevole. Ĉar li pensis, ke li komprenas ĉion kaj estas elektita prijuĝi ĉion, li vokis: Tio ne estas ebla, la kanteto de Pajno estis centfoje pli beleta. Al mi plaĉas, kaj se plaĉas al mi, ĝi devas esti pli bona. Ĉu vi ne havas orelojn?"

Kolere Apolono proksimiĝis al la reĝo kaj pinĉis perfingre liajn orelojn. Tiuj tuj ŝanĝis sian formon, fariĝis pli longaj kaj kovris sin per griza felo.

"Nun vi havas la orelojn, kiujn vi meritas", diris la kolera dio kaj malaperis.

Midaso tuŝis sian kapon kaj palpis longajn azenajn orelojn. Tro malfrue li pentis, ke li enmiksiĝis en la konkurson, kiun li ne komprenis. Li kuris hejmen kaj la azenaj oreloj batadis sur lian kapon. Hejme li metis al si grandan turbanon sur la kapon kaj kaŝis sub ĝi siajn orelojn. Sed post kelke da tempo la oreloj tiom kreskis, ke li ne plu povis kaŝi ilin sub la turbano. Li do

vokis sian serviston, kiu pli frue ĉiam tondis la hararon de la reĝo, kaj malkaŝis sian sekreton al li. "Ekde nun scias tiun malĝojan sekreton ni ambaŭ! Perfidu ĝin al neniu, ĉar alie vi pagus por tio per viva vivo!"

La servisto tremis je la tuta korpo, li ne kuraĝis diri al iu, kion li vidis sur la kapo de la reĝo. La sekreto tamen ŝarĝis lin tiom, ke li ne povis elteni ĝin. Li pripensis kaj pripensis, kiel li povus liberigi sin de la ŝarĝo, kaj tiam, en sendorma punkto, li havis ideon.

Matene li iris al la rivero post la urbo, fosis en sola loko truon en la teron kaj flustris en ĝin: "Reĝo Midaso havas azenajn orelojn."

Tiam li fermŝutis la truon per tero kaj opiniis, ke li tiel entombigis sian sekreton por eterne. Tio plifaciligis lian animon. Kontente li reiris en la urbon, kaj ekde tiu tempo nenio plu premis lin. Li tondis la hararon de la reĝo kiel antaŭe.

Ekde tiu jaro kreskis je tiu loko ĉe la rivero densa fragmito, kaj kiam la vento karesis ĝin, la fragmito susuris kaj flustris: "Reĝo Midaso havas azenajn orelojn."

Tiel ĉiuj homoj eksciis la sekreton de la reĝo. Finfine la dioj foje bone videble signis la stultecon, ili pensis kontente. Sed bedaŭrinde Apolono ne donas al ĉiu stulta arogantulo tian grandiozan donacon.

El la ĉefha lingvo tradukis Cezar
"Malnovaj grekaj fabeloj kaj mitoj"
eldonis ALBATROS PRAGO, 1961

<http://cezartradukoj.blogspot.com.tr/2012/06/eduard-petiska-midaso-greka-mito.html>
 Malnovaj Grekaj Mitoj

Vortareto

		kliniĝi	eĝilmek	pramaljuna	yaŝlının da yaŝlısı
		kornohava	boynuzu olan	preteriri	öteye gitmek
adoranto	tapınan kişi	kriĉadi	çirkin çığlık atmak	prudenta	ihtiyatlı, basiretli
akompanataro	birlikte olan kişiler	lamenti	pişmanlık duymak	rave	rüya gibi
argila	toprak, kil	memkaŝado	saklambaç	ruzeco	kurnazlık
bokpieda	keçi ayaklı	muzogvidanto	ilham rehberi	seli	selesini koymak
bosko	koru, ağaçlık	nevole	isteksiz olarak	sirinkso	bir çeşit borazan
brido	dizgin	nimfo	su perisi	spiko	başak
burgo	ilçe, belde	orbulo	altından köfte	ŝrikkanta	çığlık atarak şakiyan
delikata	kırılgan	oren	altına	susuri	hışırdamak
deŝovi	iterek uzaklaştırmak	orgojlo	kibir	trembrilan	titreyerek parıldayan
ektinti	çınçın etmeye	oriĝanta	altına dönüşen	trempi	banmak
	başlamak	Pajno	Pan tanrısı	turbano	türban
embuskanta	tuzak kuran	pajnoŝalmo	pan pipe	vando	duvar, çeper
enmiksiĝi	bulaşmak	penti	tövbe etmek		
entombigi	gömmek	pinĉi	çimdiklemek		
fermŝuti	bir şeyi kapatacak	pluki	didiklemek		
festeni	bayram yapmak	pokalo	fincan, kupa		
festoprocesio	bayram alayı	pompa	lüks		
flustri	fısıldamak				
fragmito	saz, biir çeşit kamış				
grasventra	yağlı gönrkli				
grego	sürü				
hopi	hoplamak				
hosos	hortum				
jubilante	jubile yaparak				
kalva	kel				
kana	kamıştan yapılmış				
karesi	okşamak				



El opero "La Oreloj de Midaso" ĉe operejo Süreyya.



KIO ESTAS LA AKUZATIVO? (parto 2)

En nia pasinta numero ni parolis nur pri la akuzativo uzata kiel la rekta objekto de transitivaj verboj. Tiu estas la plej granda kaj grava parto pri uzado de la akuzativo. Tamen oni uzas akuzativon ankaŭ en aliaj kazoj kiuj ne rilatas al la rekta objekto de la verbo. La unuan de tiujn kazojn ni listas kaj priskribas detale jene:

1) Mezuroj

1a) Tempo mezuroj : Kiam oni uzas tempo-esprimon por montri "por kiom longe", "por kiom da tempo", "por kia ofteco" ktp, oni devas uzi la akuzativon. Tiuj tempo-mezuroj povas priskribi la verbon sed ankaŭ povas priskribi la adjektivon aŭ la adverbos en la frazo. Ekzemploj:

- Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. = ...dum du tagoj kaj unu nokto.
- Li estas morte malsana, li ne vivos pli ol unu tagon.
- La festo daŭris ok tagojn.
- Ŝi tiam aĝis tridek jarojn.
- La horloĝo malfruas kvin minutojn. = ...per kvin minutoj. ...je kvin minutoj.
- Li estis dudek du jarojn aĝa. = ...je dudek du jaroj aĝa.
- La parolado estis du horojn longa.
- Tiu ĉi vojo estas milojn da kilometroj longa.
- Unu momenton poste ŝi malaperis malantaŭ ili. (la kvanton de tempo, kiu pasis post io)
- Ŝi estas du jarojn kaj tri monatojn pli aĝa ol mi.
- Du tagojn post tio ŝi forveturis al Norvegujo. (pasis du tagoj post "tio")

1b) Distanc-mezuroj : mezuroj pri alteco, longeco, grandeco, distanco, profundeco, prezo, kosto ktp. Tiu frazpartoj respondas al demandoj kiel : "kiom da kvanto", "kiom multe", "kiom for", "kiom longa", "kiom alta", "kiom profunda", "kiom peza" ktp. Ekzemploj:

- Ĝi kostas dek mil eŭrojn.
- Vi devas kuri pli ol dek kilometrojn.
- La vojo larĝis dudek metrojn aŭ iom pli.
- Monto Everesto estas ok mil okcent kvardek ok metrojn alta.

- Ili staris nur kelkajn metrojn for de mi.
- La domo estis ducent metrojn distanca.

Sed se la mezuroj ne priskribas ion kaj ili estas la subjekto de la frazo, tiam oni ne uzas akuzativon. Ekzemple:

- Dek jaroj estas tre longa tempo.
- Pasis du tagoj.

1c) Tempo punktoj : Tiuj estas frazpartoj kiuj respondas al demandoj kiel: "Kiam", "en kiu dato", "en kiu tago", "en kiu jaro", "kiom da fojoj" ktp. Ekzemploj:

- Unu tagon estis forta pluvo. = En unu tago...
- Ĉiun monaton li flugas al Pekino.
- Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua = En la dudek dua tago de Februaro...

Do, ni povas diri ke anstataŭ prepozicio ni povas uzi akuzativon ekzemple en tag-nomoj kaj tiu montras la certecon de la tago:

- * dimanĉon = "en certa konata dimanĉo" (venonta dimanĉo)
- * dimanĉe = "en dimanĉoj, en ĉiu dimanĉo" (en ĉiu dimanĉo)

- Ekzemplo: Mi alvenos en Lyon lundon la 30-an de Aŭgusto

Ĉar en horaj esprimoj ni uzas la prepozicion "je", ni povas distingi inter dato kaj horo. Ekzemploj:

- Tio okazis la dekan. = Tio okazis en la deka tago de la monato.
- Tio okazis je la deka. = Tio okazis je la deka horo de la tago.

Denove, se datoj ne priskribas ion kaj ili estas la subjekto de la frazo, tiam oni ne uzas akuzativon. Ekzemple:

- Hodiaŭ estas sabato, kaj morgaŭ estos dimanĉo.

(daŭrigota)

Portreto - Katalin Kováts



Katalin KOVÁTS (naskiĝis la 16-an de oktobro 1957) estas hungara matematikisto, lingvisto, metodologo kaj esperantisto, loĝanta en Nederlando.

Ŝi havis postenon en la hungara universitatranga katedro de aplikata

lingvistiko, kie inter aliaj ankaŭ interlingvistiko estas la baza studobjekto por estontaj lingvistoj. En sia doktoriĝa disertacio ŝi analizis la propedeŭtikan valoron de Esperanto. Krom doni teoriajn lekcionojn, ŝi ankaŭ trejnigis lingvoinstruistojn pri metodologio. Siajn spertojn ŝi aktive uzas en la plibonigo de la Esperanto-instruado.

Ŝi gvidis multajn Esperanto-kursojn kaj metodikajn seminariojn dise en la mondo (antaŭe kiel Katalin Smidéliusz), kaj nuntempe ŝi okupiĝas pri la redaktado de la porinstruista ttt-ejo Edukado.net. Ŝi estas kunlaboranto de la gazeto Monato ekde 1994 kaj estis vicredaktoro de Internacia Pedagogia Revuo (IPR).

Katalin Kováts kun sia franca edzo Sylvain Lelarge havas kvarlingvan filon, Martin (10-jara en 2012). Ŝi

estas ankaŭ patrino de Petra Smidéliusz, estraranino de TEJO.




En la jaro 2010 ŝi post enketo de La Ondo de Esperanto elektiĝis Esperantisto de la Jaro.

Verkoj

- «Ĉu vi aŭdis, ke... ?»
- Omaĝlibro al Andreo Cseh
- Kunaŭtorino kaj eldoninto de Poŝamiko
- Manlibro pri instruado de Esperanto, kolektiva verko, redaktis Katalin Kováts, Espero / ILEI - Partizánske / Hago, Junio 2009, ISBN 9788089 366057
- Multaj artikoloj en IPR kaj revuo Esperanto

Fonto:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Katalin_Kov%C3%A1ts



Tago de Patrinoj



Volontula Domo por UEA — Bona Ideo!



La Estraro de UEA planas aĉeti plurĉambran loĝejon en Roterdamo por akcepti pli da volontuloj.

Kion mi povas fari?

Vi povas helpi al la realigo de la projekto per donacoj al UEA. Vi povas lasi al UEA seninteresan krediton. Vi povas konstante

kontribui al la kostoj per monataj donacoj al Volontula Fondaĵo de UEA.

Personoj, kiuj donacas minimume 10.000 EUR povas decidi pri la nomo de ĉambro de la Volontula Domo. Homoj, kiuj donacas pli ol 1.000 EUR estos menciitaj en speciala metala honor-tabulo en la volontula domo kaj en la CO de UEA. Krome ni informas pri viaj donacoj en la revuo Esperanto kaj en la interreto <http://www.uea.org/asocio/volontuladomo>

La 9-a Mezorianta Kunveno an Urgupo

Inter la 1-a kaj 4-a de aprilo okazis la 9-a Mezorianta Kunveno en urbeto Ürgüp (Urgupo) de Kapadokio. En la kunveno partoprenis 24 homoj, kiuj venis el 13 landoj kaj 3 kontinentoj. Bedaŭrinde, ke pro la lasta politika situacio en Turkujo tiu nombro restis ĉe 24.

La temo de la kunveno estis la fama poeto Nazim Hikmet Ran, do, oni disdonis libreton pri la vivpriskribo de Nazim Hikmet kaj liaj 10 poemoj tradukitaj esperanten. Prelego pri la vivpriskribo de Nazim Hikmet okazis dum la kunveno kaj spektado de du filmoj kun esperantaj subtekstoj okazis dum la vesperoj.

1) La unua filmo, "Du Junuloj de la Sama Kvartalo", estis nigra-blanka rusa filmo de la jaro 1957, kies scenarion verkis Nazim Hikmet dum lia forfuĝo en Rusio. La filmo prezentis al ni du junuloj kun la samaj idealoj sed kiuj poste sekvis malsamajn vojojn. Kvazaŭ unu el ili estas Nazim Hikmet kaj la alia Va-La Nureddin, la amiko de Nazim en sia juneco.

2) La dua filmo, "La Bluokula Giganto", estis kolora filmo kaj turka-greka komuna produktaĵo en kiu ni trarigardis la naŭ jarojn de Nazim Hikmet en Bursa malliberejo.

En la komenco de la kunveno estis prelego pri Kapadokio kiu celis enkonduki la partoprenantojn al la postkunvenaj ekskursoj. Du pluajn prelegojn, faris du lernantoj. La unua estis pri la "Bibliotekisto kun Azeno" kiu vivis en ĉi tiu parto de Turkujo kaj la dua estis pri kiel la preleganto lernis Esperanton, kiel rilatas Esperanto al la turka lingvo, kaj kiel la preleganto dank' al Esperanto partoprenis kiel prizorganto en la IJK kiu okazis samtempe kun la 100-a UK en Lilo.

En nia Kunveno ankaŭ estis aldonita la 23-a AMO seminario. AMO signifas "A-ktivulo M-aturiĝ-O". Por tiu celo estis prelegoj pri la Historio de la Turka Esperanto Movado, kaj ankaŭ prelego pri kion ni nuntempe faras por disvastigi Esperanton en Turkujo. Kiel ni provizas



La partoprenantoj atenteme aŭskultas la prelegojn.



Renato Corsetti parolas dum la AMO-23 seminario.



Bengt Nördlof rakontas pri la rifuĝintoj en Svedujo.



Mireille Grosjean prelegas pri Eŭropa Unio kaj Turkujo.

la novulojn kun informoj pri Esperanto kaj Esperantujo. Kiel ni provas disvastigi Esperanton. Kiel ni page reklamas en facebook-o pri Esperanto ktp. Ni ankaŭ diskutis la temon krei Turkan Esperanton Asocion.

E I Kunveno oni diskutis pri la stato kaj disvastigo de Esperanto en la arabaj landoj. Estis multaj aliaj diskutoj pri la aktuala problemo de la rifuĝintoj. Kaj post tiuj diskutoj oni verkis la rezolucion de la Kunveno.

La rezolucio estis duparta:

1) La unua sugesto estis al UEA por komenci klopodojn eklernigi Esperanton al la rifuĝintoj en Turkujo kaj Grekujo, do, poste kiam ili decidis pri la lando ili enmigros ili pli facile lernos la lingvon de tiu lando. Oni ankaŭ rakontis pri kion oni faris en Norvegujo por rifuĝintoj.


2) La dua sugesto estis al la Komitato de UEA por trovi kaj provi alian kanalon por propagandi kaj

disvastigi Esperanton en la arabaj landoj, ĉar araboj jam havas misfidon al ĉio, kio venas el okcidentaj landoj el Eŭropo. Aliaj kanaloj povus esti Ĉinujo, Hindujo, kaj eble Irano.

Post la kunveno estis du-tagaj ekskursoj.

1) En la unua tago ni ekskursis al la vidindaĵoj en la centro de Kapadokio. En la "Valo de imagoj" ni vidis la strangaj surteraj formaĵoj, en "Paşabaĝı" ni vizitis la grandajn "feinajn kamentubojn", en "Avanos" urbeto ni vizitis potfarejon kaj la subteran muzeon pri potfarejo, en "Göreme" urbeto ni vizitis la famajn monaĥejon kaj preĝejojn enfositajn en la rokoj kaj en la "feinaj kamentuboj", en "Uçhisar" urbeto ni surgimpis la plej altan kastelon enfosita kaj skulptita en tre granda roko, kaj poste en "Kızılçukur" kie la surteraj formaĵoj estas ruĝaj, ni trinkis kafon kaj vinon en kafejo rigardante la sunsubiron.

2) En la dua tago ni vizitis la subteran urbeton de "Kaymaklı", kaj poste ni vizitis la kanjonon nomita



Vasil Kadifeli prelegas pri historio de la turka Eo movado.



Anna Lowenstein rememorigas la sufiksojn -ig kaj -iĝ.



Ni multe diskutis la temon de rifuĝintoj.



Skype-a babilado kun afrika esperantisto.

"Valo de Ihlara", kie iam loĝis 80,000 homoj en fositaj domoj en ambaŭ la du muroj de la kanjono. Ni ankaŭ promenis 4 km en la kanjono laŭ la rivereto tie.

Vespere en nia revenvojo ni vizitis "Ağzıkarahan" karavansarajo aŭ hotelo por karavanoj.

Dum la kunveno, multaj vesperoj ni kunmanĝis kaj diskutis diversajn aferojn.

Paralele de la kunveno okazis Esperanto kurso por tiuj, kiuj bezonis ĝin.



Öykü Mete prelegas pri la "Bibliotekisto kun azeno".




Yusuf Narinoĝlu prelegas pri Eo kaj turka lingvo kaj lia partopreno en la IJK ĉe Lillo.



Gustumado de kartvela vino kaj turkaj manĝaĵoj.



Kartvelaj Esperantistoj vizitis nin.



Dum la kunveno estis spektado de du esperante subtekstitaj filmoj dum du vesperoj.



Intertempe Eo kurso okazis ekster la salono.



Ni multfoje trinkis teon kaj kafon.



Ni vizitis subteran muzeon pri potoj kaj ankaŭ en la potfarejo oni elmontris faradon de speciala poto al ni.



Ni vizitis la subteran urbon "Kaymaklı".



Ni vizitis "Ihlara" valon kaj ni piediris preskaŭ 4 km en la kanjono de "Ihlara".

STUDIO - RADIO TELEVIDO EN ESPERANTO

La filmojn ni spektis dum la Kunveno ankaŭ prezentas STUDIO-RADIO TELEVIDO kun esperantaj subtekstoj. Jen la ligilo:
<http://novajhoj.weebly.com/du-filmoj-el-turkio.html>

Du Junuloj de la Sama Kvartalo

La filmo prezentas la tempon en Turkujo inter la jaroj 1940 kaj 1950. Du junuloj kreskas en la sama kvartalo kaj ili kontraŭstaras la malbonan iradon de la tiama politika situacio. Sed poste iliaj vojoj disiĝas. La unua (Nuri) asimiliĝas al la establita ordo de la lando sed la dua (Ahmet) daŭras siajn klopodojn kaj protestojn kontraŭ la maljustecoj, kia ajn estos la konsekvencoj.



Du Junuloj de la Sama Kvartalo



Dvoe iz odnogo kvartala

La Bluokula Giganto

La filmo temas pri fragmento de la vivo de Nazim Hikmet en la malliberejo de Bursa urbo. Nazim instruas la poste faman turkan pentriston İbrahim Balaban kiel pentri, kaj ankaŭ instruas la verkiston Orhan Kemal kiel verki prozojn. Orhan Kemal tiam estis nur poeto. En la fono de la filmo daŭras la Dua Mondmilito kaj homoj kurioze sekvas la travivaĵojn en Eŭropo. En la tiama Turkujo estis ambaŭ apogantoj de faŝismo kaj maldekstruloj kiel Nazim Hikmet.



La Bluokula Giganto Mavi Gözlü Dev

Longdaŭra Filmo el Turkio kun subtekstoj en Esperanto

KOLLARI BAĞLI ODYSSEUS

-- DÖRDÜNCÜ BÖLÜM --

1.

Kara gemi Okeanos ırmağının
Akıntısından kurtulup tanrısal
Denizde Ayaye adasına varınca
Onu kumsala çektik ve uykuya
Dalarak tanrısal şafağı bekledik.
Sabah sisi içinde doğan
Gül parmaklı şafak
Elpenor' un yüzüstü yatan ölüsünü
Bulmuştu ilk önce kıyıda.
Martı leşleri ve deniz kabukları arasına
Törenle gömdük onu kederli
Gönülle ve yanık yüzlü şaraptan
İçerek dinledik Kirke'yi.

2.

Tanrıçaların en tanrısalı
Güzel belikli Kirke eyitti :
"Sen Odysseus iki ölümlüsün
Hades'i gördün daha yaşarken
Güneş doğmayan neşesiz ülkeyi
Günlerce karanlıkta kaldın
Çünkü İthaca yaşatıyordu seni
Tanrısal denizde ordan oraya
Bin yıldır aradığın ada...
Konağının sarsılmaz temeli
İkarios kızı Penelopeia
Ve erdemli dölün Telemakhos
Bütün ülkün ve sevgin olan İthaca."

3.

İyi dinle söyleyeceklerimi
Her şeyi olduğu gibi anlatacağım sana
Ki yeni uğursuzluklar yüzünden
Denizler ortasında kalma bir daha.
Önce Sirenlere rast geleceksiniz
Koruyun onlardan kendinizi
Yabansı ezgilerle büyüleneceksin
Ordan çarçabuk uzaklaşmalı ki
Büsbütün yok olmasın İthaca.
Sirenleri aştıktan sonra kürekçilerin
İki yol çıkacak karşına birden
Acaba bunlardan hangisi?
Artık onu orda sen bileceksin!"

ODISEO KUN LIGITAJ MANOJ

-- KVARA PARTO --

1.

La nigra ŝipo liberiĝinta
de la akvo fluo de la rivero Oceano
alvenis al Ajaje insulo en la dia Maro.
Tiam ni elakvigis ĝin sur la strando
kaj endormiĝis atendente la dian vesperiĝon.
La krepusko kun rozaj fingroj,
kiu naskiĝis en la matena nebulo,
unue trovis la mortinton Elprenor
kuŝanta vizaĝalteren sur la strando.
Ni lin kun ceremonio malgaje entombigis
inter la mortintaj mevoj kaj mar-ŝeloj.
Poste ni kore aŭskultis Kirke-n
trinkante la brulvizaĝan vinon.

2.

La plej dia el la diinoj
bela Kirke kun siaj harplektaĵoj diris:
"Vi Odiseo estas du-morta.
Vi vidis Hadeson dum vi estis vivanta,
la landon kie suno ne naskiĝas,
kaj restis dum multaj tagoj tie.
Itako, la insulo kiun vi traserĉas
dum mil jaroj en la Dia maro,
el unu flanko al la alia, vivigis vin....
La senŝanĉeliganta fundamento de via domo
Penelopo, la filino de Ikario,
kaj via virta devenanto Telemaĥo,
ka Itako kiu estas via tuta amo kaj idealo."

3.

"Bone aŭskultu miajn dirojn.
Mi ĉion ekzakte rakontos al vi
por ke vi ne restu en la mezo de la maroj
ankoraŭfoje pro la malbon-aŭguraĵoj.
Vi unue renkontos la Sirenojn.
Protektu vin de ili
ĉar vi ensorĉiĝos de iliaj sovaĝaj melodioj.
Vi devas tuj foriri de tie
por ke Itako ne entute malaperu.
Post ke viaj padelistoj preteriros la Sirenojn
subite du vojojn vi renkontos.
Sed kiu el ili estos la ĝusta vojo?
Tion vi mem decidus tie!"

4.

Oysa Íthaca'yi hiç görmemişim
Penelopeia yoktu, Telemakhos da,
Ama Íthaca kafamda onlardan kurulu idi.
Tanrıçaların en tanrısali
Kirke'nin bile söyleyemediği
Bu yolu bulup geçeceğim;
Ama ne denli güç olursa olsun
Bilerek varmak istiyorum şimdi
Sirenlerin ezgilerini dinleyeceğim
Dedim ve büyük bir mum peteğini
Tunç hançer ucu ile ezdim çabucak
Tıkadım kürekçilerin kulaklarını bir bir
Orta direğe bağlattım kendimi.

5.


Kürekçilerim hasatsız denizi
Köpürttüler kürekleriyle,
Tez yürüyüştü gemi gün batarken
Ulaştı Sirenlerin adasına,
Yüreğim kopacak gibiydi
Kanatlanıp uçacak gibiydi, ama
Sirenlerin izi bile yoktu ortada.
Yalnız bir ezgi, ta derinden
Ta içerimden gelen bir ezgi
Başladı yavaş yavaş yükselmeye;
O yabansı, o büyülü türküleri ben
Söylüyordum sağır gemicilere
Yalnız ben duyuyordum Sirenleri.
Kirke, bilge tanrıça, selam sana!
Sağ salim geçtim kendimi.

4.

Sed mi Itakon neniam vidis.
Nek Penelopo ekzistis, nek Telemako.
Sed Itako estis establita en mia cerbo per ili.
Tiun vojon, kiun eĉ Kirke,
la plej dia el la diinoj ne scias,
mi trovos kaj trapasos.
Sed kiom ajn malfaĉila estos,
mi sciante volas alveni kaj
aŭskulti la melodiojn de Sirenoj.
Mi diris tion kaj grandan vakson de mielĉelaro
per la pinto de bronza ponardo mi tuj premis kaj per ĝi
mi unu post la alia blokis la orelojn de miaj remantoj
kaj poste ŝnurligis min en la meza masto.

5.

Miaj padelistoj la senrikoltatan maron
ŝaumigis per siaj padeloj
kaj la rapide iranta ŝipo vesperiĝante
atingis la insulon de Sirenoj.
Mia koro rompiĝus kaj
ŝajnis kiel ĝi ekflugus, sed
ankoraŭ ne estis spuroj de Sirenoj.
Nur ia melodio el la profundo,
melodio venanta el la mezo de mia korpo,
komencis kaj paŝo post paŝo laŭtiĝis.
Tiujn sovaĝajn, tiujn sorĉantajn kantojn
mi estis kantanta al miaj surdaj maristoj.
Nur mi estis aŭdanta la Sirenojn.
Kirke, saĝa diino, saluton al vi!
Mi senvunde preterpasis min.



MELİH CEVDET ANDAY (13 -a marto 1915, Istanbulo – 28-a novembro 2002, Istanbulo) estas tre grava turka verkisto kaj ĉefe poeto kies unika stilo de poezio estis eskter la ordinaraj tradiciaj poezi-movadoj de Turkujo. Tiu belega poemo estas fragmento de lia poezi-libro "Odiseo Kun Ligitaj Manoj" kiun li verkis en la jaro 1963. Lia tombo estas en Büyükkada insulo.





La kvar amikoj

For de iu ajn urbo troviĝis arbaro en kiu ĉiuj bestoj kaj birdoj pace kunvivis.

La arbaro estis la hejmo de kvar ne disigeblaj amikoj: cervo, testudo, korvo kaj muso. Ĉiun vesperon ili kuniĝis por diskuti pri la okazaĵoj de la tago. Sed iun tagon la cervo estis tre maltrankvila.

"Ĉasistoj metas kaptilojn ĉien. Ĉu eblas fari ion por eviti resti kaptitaj en ili?"

"Jes, eblas", tuj respondis la korvo. "Nia amiko, la muso bone scias tion."

La korvo ekrakontis tion, kion ĝi vidis. "Antaŭ kelkaj tagoj mi rimarkis ion eksterordinaran. Aro da kolomboj estis kaptitaj en la reto de ĉasisto kaj movis la flugilojn rapidege pro paniko. Kaj subite la kolomboj ĉiuj kune prenis la reton en siajn bekojn kaj flugis en la ĉielon. Kien ili tiam flugis? Rekte al nia amiko, la muso! Per siaj akraj dentoj ĝi dispecigis la reton. Finfine, ree liberaj la kolomboj forflugis. Ili estis tre dankemaj al nia amiko."

Post tiu rakontado la cervo foriris por trovi akvon. Dume la tri amikoj ekmanĝis fruktojn, plantojn kaj foliojn en la arbaro. Ili babilis ĝis malfrue dum la nokto, atendante la revenon de la cervo. Sed la cervo tute ne videblis kaj la amikoj komencis maltrankviliĝi.

Matene tuj post kiam heliĝis, dum la aliaj vokis la cervon, la korvo flugis al ĉiuj direktoj por trovi ĝin. En maldensejo ĝi ekvidis la cervon kun piedo kaptita en reto.

"Ne timu," ĝi trankvile diris "ni trovos la solvon."

La korvo rapide reflugis al siaj amikoj.

La testudo havis ideon, "Muso, grimpu sur la dorson de la korvo." Kaj ili ekflugis por savi la cervon.

Sen perdi tempon la muso per siaj dentoj rompis la reton. Precize tiam la testudo kiu tre zorgis alvenis.

"Kial vi venis tien-ĉi? Se la ĉasisto revenas, vi ne sukcesos forkuri," la cervo diris.

La ĉasisto ja revenis! Aŭdante liajn paŝojn ĉiuj rapidis for, krom la testudo kiu ne kapablis sufiĉe rapidi. La ĉasisto kaptis ĝin kaj ligis ĝin al bastono.

"Ho ne! Pro mi la malfeliĉa testudo estas en malbona situacio," diris la cervo.

Subite la cervo eksaltis kaj rapidis al laĝeto apud la vojo. Tie ĉi kuŝis tute senmove, dum la korvo mordetis ĝin. Tiam la ĉasisto forlasis la testudon por preni la cervon.

La muso tuj rompis la ŝnurojn kaj liberigis la testudon. Dum la testudo eniris la akvon, la cervo forkuris kaj la korvo simple forflugis.

La ĉasisto tremis pro timo. Li neniam antaŭe vidis beston kiu post morto ree vivas.

Pensante ke la arbaro estas hantata li ekkuris kiel eble plej rapide!

La kvar amikoj reiris hejmen kaj felicis esti denove kunaj.

Prenita de Bukboks

<http://www.bookbox.com/products/four-friends?plang=esp>



Vortareto

Yandaki basit hikayeyi okuyabilmek için sizlere alfabetik sırada aşağıdaki sözlüğü hazırladık. Kolay gelsin...

akra	keskin
alveni	gelmek, varmak
antaüe	daha önceden
apud	yanında
arbaro	orman
aro	sürü
atendante	bekleyerek
aüdante	duyarak
babili	sohbet etmek
bastono	baston
beko	gaga
çasisto	avcı
cervo	ceylan
çielo	gökyüzü
dankema	müteşekkir olmak
denove	yeniden
disigeblaj	ayrıştırılabilir
diskuti	tartışmak
dispecigi	parçalara ayırmak
dorso	sırt
ebli	imkan dahilinde olmak
ekmanĝi	yemeğe başlamak
ekrakonti	anlatmaya başlamak
eksalti	sıçramak
ekstreordinara	olağan dışı
eviti	kaçınmak
felici	mutlu olmak
finfine	en sonunda
flugilo	kanat
folio	yaprak
for	uzak
forflugi	uzağa uçmak
foriri	uzaklaşmak
forkuri	uzağa kaçmak
forlasi	bırakmak
grimpi	tırmanmak
hantata	perili
heliĝi	aydınlanmak
Ho ve!	Eyvahlar olsun!
ja	gerçekten de
kapabli	becermek, başarmak
kapti	yakalamak
kaptilo	tuzak
kaptita	yakalanmış
kolombo	güvercin
korvo	karga
krom	-den/-dan başka
kuna	birlikte olan

kune	birlikte
kuniĝi	bir araya gelmek
kunvivi	brlikte yaşamak
lageto	küçük göl
liberigi	serbest bırakmak
ligi	bağlamak
maldensejo	açıklık yer
malfeliça	mutsuz, zavallı
malfrue	geç
maltrankaviliĝi	endişelenmek
maltrankvila	endişeli
mordeti	küçük küçük gagalamak, ısırarak
morto	ölüm
muso	fare
neniam	hiç bir zaman
okazaĵo	olay
pace	barışçı şekilde
paniko	panik
paŝo	adım
pensante	düşünerek
per	ile, vasıtası ile
perdi	kaybetmek
planto	bitki
precize	tam olarak
rakontado	hikayeleme
rapidege	çok hızlı
rapidi	hızlanmak
ree	tekrar, yeniden
rekte	doğrudan
reto	ağ
reveno	dönüş
rimarki	farketmek
rompi	kırmak
savi	kurtarmak
senmove	hareketsiz
sia	kendisinin
simple	basit şekilde
situacio	durum, vaziyet
ŝnuro	ip
solvo	çözüm
subite	aniden
sufiçe	yeterli şekilde
sukcesi	başarmak
testudo	kaplumbağa
timi	korkmak
timo	korku
trankvile	sakin şekilde
tremi	titremek
troviĝi	bulunmak
videbli	görülebilir olmak
voki	seslenmek
zorgi	ilgilenmek, endişe etmek

Mallonga Historio de Filozofio (4)




Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la mallongan historion de Filozofio kun Pirono, la tre stranga kaj ridinda filozofo de la historio.

Vasil Kadifeli (1959) Istanbulo

Pirono (365-270 AK) - (Pyrrho en angla)

Pirono estas la unua skeptikulo de Ateno. Li pensis ke



“Neniu povas scii ion certe, kaj eĉ tio ne estas certa! Eble vi malĝustas pri tio, kion vi pensas esti vera, ĝusta kaj certa. Ĉiam havu malfermitan menson.” Tiu filozofio fariĝis tre populara por kelkaj jarcentoj en antikva Grekujo kaj poste en Romo.

Pirono estis la plej ekstrema skeptikulo kaj li vivis tre strangan vivon. Li portis la pensmanieron de Sokrato antaŭen, sed fakte tro antaŭen. Ekzemple, vi nun legas tiun revueton sed ĉu vi certas pri tio? Eble vi revadas. Tiun filozofion post 1800 jaroj ankaŭ adoptis Kartezio (René Descartes).

Pirono ankaŭ verkis nenion, ĝuste tiel, kiel Sokrato. Ĉio, kion ni scias pri li estas el la verkoj de Diogeno Laerto. La vivado de Pirono estis tre stranga kaj oni povas diri ke se li ne havus bonajn geamikojn kiuj protektis lin, li eble mortus tre juna. Neniu piedirus je la rando de kruta klifo, sed por Pirono tio estis normala afero ĉar laŭ li, li ne estis certa ke li estis piediranta je la rando de kruta klifo, kaj eĉ se tio estis vera kiu certus ke li falus el la klifo kaj eĉ se li falus el la klifo kiu certus ke li mortus. Do liaj bonaj geamikoj ĉiam protektis lin kaj eble li tiel travivis ĝis sia 95-a jaraĝo! Por li vidaĵoj aŭ aspektoj estis mensogantaj. Lia trankvila stato de menso ĉiam maltrankviliĝis ĉiujn proksimulojn de li.

En sia juneco li vizitis Hindujojn kaj eble li estis influita de la tieaj filozofoj ĉar lia maniero de filozofio estas tre proksima al mistikismo. Li kredis, ke ĉio, kio maltrankviliĝas homojn estas iliaj juĝoj, sed se ne estas vojo malkovri la veron tiam ne estas kialo por maltrankviliĝi. Ni devas forlasi ĉiujn firmajn kredojn ĉar ili ĉiam estas

imagaj. Oni dirus ke li estas frenezulo sed liaj kondutoj estis tre koheraj. Li tre klare rezumis sian filozofion:

“Kio estas la reala karaktero de objektoj? Kio devas esti nia sinteno kontraŭ la objektoj? Kion ni gajnas per ŭsta sinteno kontraŭ la objektoj?”

Lia respondo estis tre simpla kaj trafa :

“Neniu povas esti certa pri la reala karaktero de objektoj. Do, homoj ne povas respondi al tiun demandon. Pro tio ni devas forlasi tiun demandon. (Tiu estas kontraŭ diro al la Teorio de Formoj de Platono). Do ni ne devas submeti i al iu ajn opinio. Pri nenio ni povas esti certa. Ni ankaŭ ne povas esti certa pri kio estas pli bona ol io alia. Por esti feliĉa ni ne devas zorgi pri tiaj aferoj ar ili nur maltrankviliĝos nin. Se vi sekvas tiun teorion en la komenco vi estos silentema, sed poste ni estos purigitaj de iuj maltrankviliga oj. Tio estas io la homo atendas de vivo.”

Sed nur malmultaj el ni povas fari tion, ĉu ne? Kaj se ni ĉiuj farus tion ni eble mortus ĉe la fundo de iu kruta klifo!

La malforta parto de lia teorio estis, ke dirante “Ni nenion povas scii” li atignis la opinion “Ni forlasu niajn instinktojn kaj sentojn kontraŭ io ajn danĉera”. Une kiel li povus havi tiel difinan opinion kaj due ni ĉiuj kaj ankaŭ Pirono estas homoj kun aŭtomataj reagoj kontraŭ danĉeroj.

Neniu skeptikulo en la historio de filozofio estis en tia fin-punkto. Estis multaj aliaj skeptikuloj sed kun pli moderaj vidpunktoj. Sed ĉiu filozofo devas esti skeptikulo, ĉu ne? Alie neniu povus malkovri la veron de vivo kaj mondo. Filozofoj ne ŝatas dogmojn.

(daŭrigota)



PANELOJ: FRITAĴOJ EL LA SICILIA KUIRARTO !

La ĉifoj recepto, se mi devus kompari ĝin inter pluraj aliaj, montras grandan avantaĝon! Kutime, tradiciaj manĝaĵoj, almenaŭ tiuj konataj en pluraj landoj de "Okcidento" preskaŭ ĉiam inkluzivas iun bestodevenaĵon, ĉu viando, ĉu lakto, ĉu fromaĝo, ĉu butero... kaj ni, veganoj, devas krei alternativojn por forigi ĉian eron el besta sufero. Min ĝojigis vidi ke en sicilia kuirarto ekzistas pluraj pladoj tute veganaj, sen ajna modifo farenda! Krome, temas pri vere facila recepto kiu konsistas el malmultaj ingrediencoj. La panelojn oni kutimas manĝi aldonante iom da citronosuko kaj kun pano kovrita de sezamsemoj sed oni povas elekti ajnan panon por tio. Provu kaj gustumu ĝin!!!

Ingrediencoj:

500 gramoj da kikerfaruno
Litro kaj duono da akvo
Fenkol-semoj laŭplaĉe kaj vole
Salo laŭplaĉe
Petroselo laŭplaĉe
Abunda sem-oleo (sunflora) por friti ilin poste

Iloj:

Kaserolo, Muldilo

Preparmaniero:

En kaserolo ni aldonu la akvon, la kikerfarunon kaj la salon laŭplaĉe kaj meti ĝin sur mez-malalta fajro.

Jam de la komenco ni devas kirladi paciencie kaj ĉiam samdirekte. Post pluraj minutoj ni rimarkos ke la faruno pli densiĝas, ni ne haltu kaj daŭre kirlu ĝis



'ekmalmoliĝo' de la pasto.

Ni aldonu la tranĉitan petroselon iom pli kirlu kaj la pasto jam pretas.

Nun ni metas ĝin en la muldilon kaj post malvarmiĝo ni metu en la fridujon dum kelkaj horoj ĝis plena malvarmiĝo por ke ĝi estu pli malmola kaj ne disiĝema.

Poste ni tranĉu en fajnajn pecojn kaj fritu en varma oleo.

Por forigi la troan oleon kiun ili havas, ni uzu kuirpaperon por tio.

Kaj la paneloj jam pretas! Bonan apetiton!!

Fonto: el la retejo "Vegan Arto" de Andy Hernández kaj Enric Baltasar.

<http://veganarto.net/paneloj-fritaĵoj-el-la-sicilia-kuirarto/>

VeganArto ★

Vortareto		ingredienco	iĉerik	panelo	panel, yaprak, cips, kraker
besta sufero	hayvan eziyeti	jam	zaten	pasto	hamur
bestodevenaĵo	hayvandan gelen şey	kaserolo	tencere	peco	parça
citronsuko	limonsuyu	kikerfaruno	nohut unu	petroselo	maydanoz
densiĝi	kıvımlaşmak	kirladi	sürekli karıştırmak	plado	tabak, yemek anlamında
disiĝema	parçalanmaya, dağılmaya meyilli	kirli	karıştırmak	preparmaniero	hazırlama şekli
ekmalmoliĝo	sertleşmeye başlama	kiurarto	mutfak sanatı	rimarki	farkına varmak
fajna	hassas, ince	kuirpapero	kağıt havlu	samdirekte	aynı yönde
farenda	yapılması gereken	laŭplace	isteğe bağlı olarak	sem-oleo	çekirdek yağı
faruno	un	malvarmiĝo	soğuma	sezamsemo	susam tohumu
fenkol-semo	rezene tohumu	mez-malalta fajro	ortadan daha aşağı ateş	sunfloro	ayçiçeği
fridujo	buzdolabı	modifo	değişiklik	trancita	kesilmiş
friti	kızartma	muldilo	kalıp	troa	fazla
		pacience	sabırlı şekilde	vegana	vegan

Kio estas "Edukado.net"?



Edukado.net estas retpaĝaro pri instruado de Esperanto. Ĝi celas ĉefe kunlaboradon inter Esperanto-instruistoj, sed estas ankaŭ helpilo por memlernantoj.

La paĝaro estis lanĉita la 15-an de decembro 2001 kaj tute renovigita en 2005. Ĝi estas prizorgata de Katalin Kováts kaj subtenata de Esperantic Studies Foundation.

Celoj

- Katalogi kaj analizi ekzistantajn instrumaterialojn
- Sekurigi kaj disponigi tra interreto valorajn, sed nepublikitajn instrumaterialojn, ekzercojn, ideojn
- Plialtigi la kvaliton de uzataj instrumaterialoj (la merkato por tiuj estas ankoraŭ malgranda, do prezoj estas altaj kaj multaj personoj faras mem instrumaterialon, ofte malbonkvalitan kaj erarplenon)
- Helpi kunlaboradon inter instruistoj per kreado de virtuala komunumo
- Faciligi interŝanĝon de spertoj kaj materialoj
- Ebligi ĉiutagan uzon de la lingvo

- Alporti subtenon per tuja respondo al demandoj, petoj kaj mesaĝoj
- Instigi sisteman profesion evoluon kaj plulernadon
- Alporti helpon por memlernantoj
- Influi pozitive la eldonon kaj uzon de instrumaterialo (pere de publikigitaj recenzoj, komentoj kaj statistikoj pri la uzo)

Enhavo

- Instrumaterialo (tekstoj, bildoj, sonmaterialo) por ĉianivelaj kursoj
- Katalogo kun detalaj recenzoj de Esperanto-lernolibroj
- Specimenoj de internaciaj kaj naciaj esperanto-ekzamenoj
- Anoncejo kaj legejo pri eventoj en Esperantio
- Listoj de Esperanto-lernejoj kaj kursgvidantoj
- Koresponda servo
- Forumo ktp.

Por pli da informoj legu:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Edukado.net>

Krucvort-enigmo (facila)




Horizontale:

2. Antaŭe ne ekzistanta, aŭ ne konata, aŭ ne spertita; unuafoje farita, elpensita, enkondukita, aŭdita aŭ malkovrita
3. (inverse)La komenco de la plej ĝenerala ideo de io, kio estas; Regula sesedro kaj ankaŭ la plej

granda el la Antiloj, sude de Florido

4. Kvanto da tempo, pasinta ekde la naskiĝo de ekzistaĵo, aŭ ekde la ekesto de io
5. Fama turisma urbeto en Kapadocio.
6. Tiu korpoparto(j) de homo kaj bestoj rigardata kiel servanta por sin movi.
7. Prepozicio uzata por rilatigi du vortojn aŭ sintagmojn, el kiuj la unua esprimas mezuron (kvanton, pezon, longon, volumenon k.a.) de la dua.
8. Nomo kiu montras la landojn, kiuj apudas Mediteraneon, eventuale eĉ la Ruĝan Maron kaj la Persan Golfon. Malnove "Proksim-oriento".
9. Pli-malpli longa, konusa, malmola elstaraĵo, rekta aŭ kurba, el keratino, kiu kreskas sur frunto aŭ alia parto de la kapo de hufuloj, precipe la virseksaj.
10. Signi ion aŭ iun per distinga, kutime uzata vorto.
11. Esprimo de ies estra volo.



Vertikale

1. Poŝsaketo por moneroj.
2. Korpoparto de homo aŭ simio rigardata kiel ilo de agado, elfarado.
3. Stangeto, pintigita aŭ provizita per ŝtona aŭ metala pinto ĉe unu ekstremo, kun plumoj ĉe la alia, kiun oni pafas per arko.
5. Antikva lando en Malgrand-Azio, nuntempe grava turisma vidindaĵo pro sia terformaĵoj.
6. Kristaliĝinta akva vaporo, kiu defalas de la atmosfero sub formo de blankaj malpezaj floketoj ; «la

nombro da samspecaj objektoj, kiuj ne estas esence ligitaj inter si kaj ne prezentas kune ian unu ideon».

7. La ago, per kiu iu, aŭ io daŭre iras.

8. Patro de patro aŭ patrino ; Prepozicio montranta la lokon, interne de kiu estas io aŭ iu.

9. Manĝaĵo farita el knedita, fermentigita kaj bakita faruno.

11. Kolektiĝo de personoj por speciala celo, eventuale sen statuta aŭ reglamenta kadro

13. Tiu malmola parto de la vertebruloj, rigardata kiel la plej fortika kaj intima.

La solvo troviĝas en la antaŭ-lastaj paĝoj.

Ŝercoj!

La fama detektivo Sherlock Holmes kaj lia fidela kunulo D-ro Watson iras kampadi. Ili starigas tendon, ĝuas la naturon, trinkas teon, ludas ŝakon kaj fine enlitiĝas. Meze de la nokto, Holmes ekkrias al Watson:

— Vekiĝu, Watson, vekigi!

Post kelkaj minutoj, Watson, kiu profunde dormas, fine vekigiĝas:

— Kio okazas, Holmes?

— Watson, rigardu! Kion vi vidas?

— Ho, Holmes, kia beleĝa, stelplena ĉielo!

— Kaj kion signifas por vi tiu ĉi stelplena ĉielo?

Watson pripensas iomete sian respondon kaj diras:

— Nu, Holmes, tio dependas de la vidpunkto, kiun oni adoptas.

Laŭ la meteologio, ĝi signifas, ke matene ni ĝuos belan veteron.

Laŭ la astronomio, ĝi signifas, ke ekzistas milionoj da steloj en miloj kaj miloj da konstelacioj en grandega universo.

Laŭ la teologio, ĝi signifas, ke ni estas etaj kaj sensignifaj, kompare kun la potenco de la Kreinto.

Ĉu mi trafis la ĝustan respondon, Holmes?

Holmes?

— Watson, vi idioto! Oni forŝtelis nian tendon!


(el *Brazila Esperantisto* 332 - http://esperanto.org.br/info/dok/BE/BE_332.pdf)



Tempo de Tulipoj por Istanbul



Ĉi tiu sezono en Istanbul estas tempo por tulipoj kaj festivalo de tulipo. Ĉiujare dum printempo stratoj, parkoj, kaj arbaretoj plibeliĝas. Ĉi-jare estas la 10-a festivalo de tulipoj.



En Sultanahmet parko oni plantis 563 mil tulipojn por krei tapiŝon de tulipoj. La sezono de tulipoj komenciĝas en aprilo kaj daŭras

ĝis la fino de majo. Paralele okazas la festivalo pri

tulipoj. En la arbareto de Emirgan jam estas plantitaj 2,800,000 tulipoj de 192 specioj. Dum la festivalo ĉiutage muzik-grupoj sursceniĝas kaj ankaŭ okazas aliaj aktivajoj. Oni ankaŭ povas aĉeti aĵojn kies temo estas tulipoj kaj certe tulipojn

Tulipo estas la simbolo de Istanbul, do ĉie en Istanbul oni plantas tulipojn, kiuj fariĝas

ornamaĵoj kaj ankaŭ fonto de inspiado por artistoj.



Tulipoj donis la nomon al iu periodo de la Osmana imperio, kaj ili apartenas al la orienta kulturo kaj mitoj. De mez-Azio al Anatolio en niaj tapiŝoj kaj tapiŝetoj, en pentraĵoj, e ĝardenoj kaj parkoj ili estas sensepareblaj ornamaĵoj de nia vivo kaj kulturo.



Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir

kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna ekler, sözlük ve dilbilgisi ile ilgili kısa tanımları veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi tanımlarını ya da açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi

varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik.

Bu derste de çok fazla kelime yok genelde eski kelimelerin üzerinde bir tekrar dersi. Ayrıca resim de yok, metin önceki dersler ve önceki ders resimlerinin üzerinde tekrar yapıyor. Onun için önceki sayılardaki derslere bakmanız gerekecektir.

Leciono 5 - LA DEMANDOJ DE JOHANO

Johano far-as mult-ajn demand-ojn.

"Kio est-as tio?" demand-as li, montr-ante la kruĉ-on.

"Tio est-as kruĉ-o," respond-as li-a patri-no.

"Kio est-as en la kruĉ-o?"

"Est-as lakt-o en la kurĉ-o."

"Kio est-as tio?" - montr-ante la tabl-on.

"Tio est-as tabl-o."

"Ĉu la tabl-o est-as rond-a?"

"Jes ĝi est-as rond-a."

"Kio est-as tio?" - montr-ante la kat-in-on.

"Tio est-as kat-in-o."

"Ĉu la kat-in-o est-as blank-a?"

"Jes, ŝi est-as blank-a."

"Kio est-as tio?" - montr-ante la kat-id-on.

"Tio est-as la kat-id-o."

"Ĉu la kat-id-o est-as blanka?"

"Ne la kat-id-o estas nigr-a."

"Kio est-as tio?" - montr-ante arb-on.

"Tio est-as arb-o."

"Kio est-as tio?"

"Tio est-as libr-o."


"Ĉu ĝi est-as bon-a libr-o?"

"Ho! Johano, vi far-as tro da demand-oj!" dir-as li-a patrino. "Ur-u lud-i en la ludo-ĉambro."

Johano ir-as lud-i en la ludo-ĉambro.

Kelime	Aĉıklama		
dir-as	diyor, der (ŝimdiki zaman) (dir-i fiilin mastar ŝekli)	kat-id-o	yavru kedi
Ho!	oh! öf! (sıkıntılı nida)	kat-in-o	dişi kedi
ir-u	git (emir formu) (ir-i gitmek, fiilin mastar ŝekli)	kio	ne?
		montr-ante	göstererek
		rond-a	yuvarlak
		tro	çok fazla, yeterinden fazla

5-a Moskva Esperanto-renkontiĝo: la plej longa kaj amasa



La renkontiĝo daŭris sume ĉirkaŭ 10 horojn. Partoprenis 18 esperantistoj de diversaj aĝoj. El la landoj estis reprezentitaj Rusio kaj Ukrainio. El la rusiaj urboj - Moskvo kaj Tiĥvin. Sola lingvo uzata dum la aranĝo estis Esperanto, kiun flue parolas preskaŭ ĉiuj partoprenatoj de la aranĝo. La programo estis senprecedenca por tiaformata aranĝo. Entute estis realigitaj dek plenvoloraj programeroj:

1. Distancaj kaj korespondaj kursoj de Esperanto en la mondo: nuntempa stato. Ĉefe temis pri DuoLingo, lernu.net kaj la lanĉata distanca kurso de Esperanto en RUDN. Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko

2. Sekvis la prelego de Nikolao Gudskov "Ĉu indas verki pri greka filozofio en Esperanto". Prelegon sekvis diskuto kaj demandoj pri la libro de Nikolao "Kiel homo ekis pensi" (Impeto, 2012).

3. Valentin Melnikov "Kalemburoj kaj vortludoj en Esperanto". La prelego plaĉis ĉefe al la pli junaj partoprenantoj, kiuj nur komencas ekkoni riĉan Esperanto-kulturon.

4. Post manĝopaŭzo Dima Ŝevĉenko tradicie rakontis pri la atingoj kaj planoj de eldonejo Impeto. Estis prezentitaj kelkaj libroj, la plej nova el kiuj estas "Dudek kvar horoj el la vivo de virino" de Stefan Zweig.

5. Ludmila Novikova prezentis kelkajn ŝiajn novajn Esperanto-tradukojn de konataj kantoj. Unu el ili estis ne nur voĉlegita, sed ankaŭ kantita.

6. Dima kaj Anna prezentis venontajn MER-6 kaj

esperantologian konferencon, kiuj estos malfermitaj por pli vasta esperantista publiko. Sekvu informojn pri tio en la reto kaj dissendolistoj.

7. Mikaelo Bronŝtejn prezentis lian novan romanon. Titolo de la programero estis formulita jene "Intervjuo kun Mikaelo Bronŝtejn: La aŭtoro de la "ruĝa briko" respondecas, do respondas". Dum ĝi li ne nur rakontis kaj respondis la demandojn, sed ankaŭ montris fotojn, kiuj estis uzitaj/ne uzitaj en la libro.

8. Sekvis amuza koncerto de Mikaelo Bronŝtejn kun la titolo "Parto el nova recitalo de Mikaelo Bronŝtejn "Pek-kantoj, aŭ kantoj por pekantoj" ".

9. Kalejdoskopio de la venontaj renkontiĝoj prezentis ĉefajn Esperanto-renkontiĝojn, kiuj okazos somere de 2016: naciaj germana kaj hispana kongresoj (M. Bronŝtejn); BET, UK, ILEI-konferenco (D. Ŝevĉenko); IJK (A. Striganova); KET (S. Smetanina).

10. La programo finiĝis per gaja kaj vere komuna kantado de Esperanto-kantoj. Kantigis Mikaelo Povorin.

La partoprenantoj tradicie ĝuis bongustan, riĉan kaj abundan manĝotablon, preparitan de Anna Striganova. Ĉi foje estis kuiritaj kelkaj aldonaj vegetaraj pladoj, tre aprezitaj de la publiko.

Raportis Dima Ŝevĉenko. Fotoj ĉe

<https://www.facebook.com/dmitry.shevchenko.1690>



Solvo de la krucvort-enigmo de paĝo 22

Horizontale:

2. Nova. 3. Ekesto (inverse); Kubo. 4. Aĝo. 5. Urgupo. 6. Piedo. 7. Da. 8. Mezoriento. 9. Korno. 10. Nomi. 11. Ordono

Vertikale:

1. Monujo. 2. Mano. 3. Sago. 5. Kapadokio. 6. Neĝo; Aro. 7. Irado. 8. Avo; En. 9. Pano. 11. Kunveno. 13. Osto

Kapanış



Kapanış !

Mayıs ayında da sizlere Esperantujo'dan haberler sunduk. Bizim için en önemlileri Ürgüp'te organize ettiğimiz 9. Ortadoğu Toplantısı idi. Bir diğer haber de ay sonunda UEA dışişlerinden sorumlu ve önemli görevleri olan Stefano Keller'in görevinden aniden ayrılması idi. Ayrıca sizlere okuyabileceğiniz bir çok metin hazırladık, bunların bazılarını kolay okunabilmeleri için kısa sözlükler ekledik.

Bildiğiniz gibi dergimizin eski sayılarını web sayfamızın "Dergi" menüsü altındaki linklerden indirebilirsiniz:
<http://esperantoturkiye.wordpress.com/>

Her zaman dediğimiz gibi okumadan ve yazmadan bir dili öğrenemezsiniz. Lütfen okuyun, karalayın, hatta bize gönderin. Okuyucu mektuplarınızı bekliyoruz.

Lütfen "ESPERANTO TÜRKİYE" grubumuza katılın:
<https://www.facebook.com/groups/7121509722/>

Yazılarınızı bize facebook grubumuzdan ya da vasilkadifeli@gmail.com adresine gönderin.

Ayrıca Dergiye ücretsiz abone olmak için bize e-posta adresinizi gönderin.

Sonraki sayıda buluşmak üzere...

Demisio de Keller neatendita por Fettes



Libera Foiro: 2016-04-24 20:51

Tri monatojn antaŭ la fino de la mandatperiodo demisiis la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj, Stefano Keller. Prezidanto Mark Fettes diras, ke la demisio estis neatendita por li, sed ne kaŭzos problemojn.

La 22-an de aprilo en mesaĝo sendita al la komitato de UEA Stefano Keller anoncis sian antaŭtempan demision kiel estrarano pri eksteraj rilatoj. En la publika mesaĝo li mencias neniun kialon de sia demisio.

Ankaŭ al la estraro li ŝajne ne klarigis la kialon de sia foriro. La prezidanto de UEA, Mark Fettes, responde al demando de Libera Folio diras, ke li ne konas la kialon:

– Vi devas demandi Stefanon pri la kialo - lia decido

venis kiel plena surprizo.

Laŭ Fettes la "surpriza" foriro de Stefano Keller tamen ne kaŭzos tujajn problemojn.

– Jam sufiĉe multaj homoj kunlaboras pri eksteraj rilatoj, do mi ne antaŭvidas grandajn problemojn sur tiu kampo. Kaj la kongreso venos post tri monatoj, kiam okazos novaj elektoj.

Stefano Keller mem ĝis nun ne respondis al demandoj senditaj de Libera Folio, sed laŭ onidiroj la demisio povas rilati al la marĝeniĝo de la ceteraj estraranoj krom tiuj de la "mastruma teamo" (prezidanto Mark Fettes, vicprezidanto Stefan MacGill kaj ĝenerala sekretario Martin Schäffer), kiu laŭdire triope faras la plej multajn decidojn.

<http://www.liberafolio.org/2016/demisio-de-keller-neatendita-por-fettes>

MEMRISE - Esperanto Temel Kurs (Sesli)

memrise Home Courses Groups Go Pro

Courses > Languages > Constructed Languages > Esperanto

Esperanto Temel Kurs (Sesli)

Esperanto, uluslararası iletişim sorununu çözmek ve dünya barışına katkı sağlamak için oluşturulmuş, öğrenmesi çok kolay bir dildir. Dünya çapında birçok Esperanto toplantısında yeni arkadaşlar edinin; geniş ve orijinal Esperanto kitap ve müzik dünyasını keşfedin. Sorularınız için ESPERANTO TÜRKİYE Facebook grubuna uğrayabilirsiniz.

Memrise'da Utku Gürdal ve Fatih Emre Can tarafından geliştirilen Esperanto tanıtım kursu, şimdi tamamı sesli olarak dili merak edenlerin kullanımına hazır durumda. Bu kurs Esperanto dilini hiç bilmeyenlere dilin tadını alabilmeleri için tavsiye edebileceğimiz Türkçe bir kaynak. Dile başlamak için iyi bir seçenek. Kişi daha sonra bir kitaptan veya başka bir

kaynaktan dili öğrenmeğe devam edebilir.